

Malgranda fina venko – kaj velko en Hungario

En la pasintaj 20 jaroj okazis unika fenomeno, vere amasa instruado de Esperanto en Hungario, kvazaŭ "malgranda fina venko". Sukcese trapasis lingvan ekzamenon pli ol 35.000 homoj – jes, pli ol 35 mil homoj!



Bedaŭrinde tiu glora epoko nun finiĝis, kaj eble estas interese ekkoni kelkajn detalojn, nombrojn, problemojn kaj kaŭzojn – por eble eviti ilin ĉe eventuala apero de simila eblo en alia loko, alia lando.


Mi mem okupiĝas pri movada organizado ekde 30-40 jaroj, mi aktivis en preskaŭ ĉiuj niveloj, diversaj organizoj, diversaj estraroj, ktp. Nuntempe de multaj jaroj mi gvidas propran lingvoternejon (klasikan kaj interretan) kie lernas Esperanton ĉiujare plurcent (!) personoj.

Por ricevi universitatan diplomon studentoj en Hungario devas trapasi ankaŭ lingvan ekzamenon, faritan en apartaj, specialaj ekzamenaj centroj. (*Krome, post la mezlernejo, ĉe la universitataj akceptaj ekzamenoj studentoj povas ricevi kromajn poentojn pro lingvaj ekzamenoj, inkluzive Esperanton – sed tio nun estas flanka temo.*)

Ŝtate rekonitajn lingvo-ekzamenojn pri Esperanto organizas la Ekzamena Centro Origo (*antaŭa nomo ITK*), institucio de la budapeŝta universitato ELTE, kiu organizas la ekzamenojn en niveloj KER-B1, B2 kaj C1. Kiel konate, UEA subskribis kunlaboran kontrakton kun tiu ĉi institucio por realigi Esperantajn lingvajn ekzamenojn dise en la mondo.

Esperanto estis akreditita en la jaro 2000, do post tiam studentoj paŝon post paŝo malkovris la avantaĝojn de la rapida ekzameniĝ-eblo.

Ekde la komenco mi notas la statistikajn datumojn, jen la ĉefa kurbo pri la kvanto de E-lernantoj.




Kvanto de Esperanto-ekzamenoj, HU, 2000-2020

La falon post 2007 kaŭzas pluraj faktoroj, indaj je iama pli detala analizo. Unu el la ĉefaj kaŭzoj estis la konsciigo de universitataj gvidantoj pri la reala (sen)utileco de Esperanto en la faka tereno, manko de atingebla faka literaturo por siaj studentoj, manko de faka aplikeblo. Ekzisto de unu ekzemplero de iu libro en la Biblioteko Hodler aŭ en Esperanto-Muzeo Wien ne signifas utilon por la studentoj...

Okazis, ke funkciulo de dekana oficejo pretis akcepti Esperanton, se mi povas montri al li manplendon de libroj pri ilia fako, metalurgio... – kaj okazis, ke alia vicdekano simple priridis min, parolante pri la kvanto de atingebla Esperanta faka literaturo por studentoj de la medicina universitato... :-(((

Kompreneble pri la falo ludis rolon pluraj aliaj faktoroj, kiel ekzemple manko de publika agado de la landa asocio, manko de intereso-reprezentado, manko de merkatakaj rimedoj, manko de kontaktado de la koncernaj decidofarantoj en unuopaj universitatoj, ktp. La rezulto estas tio, ke unu post la alia, universitatoj ne plu akceptis Esperantan ekzamenon. Nuntempe restis nur kelkaj fakoj kiel psikologoj, konstru-inĝenieroj, infanĝardenaj pedagogoj, ktp. kie oni daŭre akceptas ĝin.



Kvanto de Esperanto-ekzamenoj-HU tendencoj 10+ jaroj

Elformado de la publika bildo pri Esperanto estas tasko de esperantistoj mem (kaj de iliaj organizaĵoj), sed pri tio oni ne aŭ apenaŭ okupiĝis en la pasintaj 20 jaroj...

Prijuĝo de Esperanto en Hungario estas dupolusa afero. Intelektuloj de antaŭaj generacioj kutime havas pozitivan opinion pri ĝi, sed tiu pozitiva fono jam mankas ĉe la junularo kaj ĉe la plenkreska anglo-snobisma tavolo. Plejparto de junuloj jam simple ne havas konojn pri la fono kaj la ekzisto de Esperanto, multaj el ili vidas nur ekzameno-trompilon en ĝi. Ekzistas ankaŭ multaj snoboj, kiuj klopodas aparteni al venkanta partio (ili konsideras tion la angla).

Pritakso de valoro de naciaj lingvoj ne ligiĝas al iliaj konkretaj lingvaj valoroj kaj uzebloj, en la socia konscio ili estas aŭtomate rekonataj - sed tio ne validas por Esperanto, kaj ne plene veras por la romaa lingvo, pri kiu ekzistas antaŭjuĝoj. Multaj universitatoj ŝanĝis la vortumadon de ilia regularo al la vortumo: "Por la lingvoekzameno estas akceptataj nur la oficialaj lingvoj de EU" aŭ la "oficialaj lingvoj de la membroŝtatoj de UN"... - Tiel ili evitas diskriminacion al Esperanto kaj romaa lingvoj, tamen ekskludante ilin.

Tro sukcesa misreklamo - malsukcesaj ekzamenoj

Koeficiento pri sukceso ĉe Esperanto-ekzamenoj jam de multaj jaroj estas 39-41 %. Tio signifas, ke el 10 ekzamenitoj sukcesas nur 4 personoj...

Unu el la kaŭzoj estas la tradicia **fuŝa slogano pri la facileco de Esperanto**. Ekzistas personoj, kiuj pro la "facileco" ekdecidas havi ekzamenon pri Esperanto, do ili rapide plenigas la aliĝilon en la reto por la sekva ekzamendato post 1-2 monatoj, kaj nur post ĉio ĉi ili komencas pensi pri kie kaj kiel lerni la lingvon? Ili elŝutas ion-tion el la reto, kaj iras al ekzameno - kie evidente ili malsukcesas.

Bazo de ilia faro estas la onidiro, ke Esperanto estas "facila lingvo". La esprimo "facila lingvo" tamen psikologie signifas, ke oni eĉ ne devas serioze lerni ĝin...!

En nia Esperanto-Centro ĉe www.eszperanto.hu jam de multaj jaroj ni forcenzuris la vorton "facila", kaj en la reklamoj ni diras, ke *"Esperanto estas multe pli rapide lernebla ol la naciaj lingvoj ..."* - sed tio jam ne ŝanĝas la publikan opinion...

Alia kaŭzo de la alta fiasko-kvociendo estas la fakto, ke **Esperanton elektas ĉefe tiuj homoj, kiuj ne sukcesis ellerni alian lingvon en sia vivo...** (kompreneble ekzistas ankaŭ esceptoj). Dum ordinaraj homoj bezonas kutime 4-5 monatojn por atingi B2-nivelon, tiuj homoj bezonus signife pli, sed pro financaj/profitaj kialoj multaj instruistoj organizis/-as 3-monatajn kursojn... - kiuj estas malpli kostaj, do la homoj elektas tiujn...

En la pasinta jaro pro la virusa situacio - kaj alia enlanda afero - krom kelkaj esceptoj (ekzemple nia Zooma lernejo) haltis la tradiciaj kursoj kaj instruado pri Esperanto en la tuta lando. Ekzameno okazis nur aŭtune, kaj multaj pli fruaj kursanoj kaj lernantoj jam forgesis multon el la lernita materialo - kaj tio videblas en la ĉi lastaj tre malbonaj ekzamenaj rezultoj...

Nyelvvizsga-statisztikák (vizsgázók száma alapján)

Sikeresség szerinti bontás nyelvek szerint 2020				
	sikeres	sikertelen	összesen	
angol	44 693	17 901	62 594	71 %
eszperantó	203	478	681	30 %
finn	14	2	16	87 %
francia	646	331	977	66 %
héber	8	3	11	72 %
holland	41	11	52	79 %
horvát	33	15	48	68 %
japán	24	15	39	61 %
kínai	10	8	18	55 %
latin	54	16	70	77 %

Sukces-proporcioj ĉe diversaj lingvoj, 2020

sikeres= sukcesa // sikertelen = nesukcesa // összesen = entute

Fonto de la datumoj: https://nyak.oh.gov.hu/doc/stat/stat_disp.asp?strID=G0
- retejo de la "Ŝtata ekzamenon-akreditiga centro"

La nivelo de la ekzamenoj jam de longe (ekde ĉ. 2006) estas unuecaj kaj samaj por ĉiuj lingvoj en la ekzamena centro Origo (ITK), kaj tiuj niveloj kaj postuloj estas koneblaj ankaŭ publike. Membroj de la ekzamena teamo povas fari nemulton, kiam aperas homoj kun 1-2 monata lernado, aŭ kiam

venas lernantoj de la menciitaj privataj instruistoj sen parola rutino... - **La nuna ĉ. 40 %-a sukces-kvociendo estas dankebla al la faktoroj:** 1./ fuŝa publika bildo pri la facileco de Esperanto, 2./ longeco de kursoj kaj kvalitoj de instruantoj, kaj 3./ karakterizaĵoj de la celgrupo, lernanta Esperanton.

Mi alkroĉas ankaŭ mian Excel-tabelon, kiun mi kompilis dum la pasintaj 20 jaroj surbaze de la datumoj de "ŝtata ekzamenon-akreditiga centro" kaj tiuj de ITK. Pluraj el tiuj retpaĝoj jam ne plu estas videblaj (en la komencaj jaroj la statistikado havis plurajn erarojn, postajn korektojn, ktp).

	sukcesa	mal-	entute		sukcesa %	MALsukcesa %
2000	332	142	474		70 *	
2001	1 409	604	2 013		70 *	
2002	2 650	1136	3 786		70 *	
2003	2 192	940	3 132		70 *	
2004	1 695	727	2 422		70 *	
2005	2 089	896	2 985		70 *	
2006	2 938	1 755	4 093		72	28
2007	3 261	2 588	6 160		53	47
2008	2 346	3 026	5 596		42	58
2009	2 332	3 254	5 586		42	58
2010	2 310	3 111	5 422	5 421	43	57
2011	2 028	3 198	5 240	5 226	39	61
2012	1 808	1 891	3 699		49	51
2013	1 574	2 039	3 613		44	56
2014	1 447	1 895	3 342		43	57
2015	1 212	1 781	2 993		40	60
2016	1 301	1 911	3 212		41	59
2017	934	1 320	2 254	2 252	41	59
2018	800	1 291	2 091	1 800	41	59
2019	740	1 121	1 861		39	61
2020	203	478	681		30	70
sume:	35601	35104	70705		46	54 %

Esperantaj ekzamenoj kaj sukces-proporcioj

Por esploristoj jen la retejo kun statistikaj datumoj de la ŝtata centro: <https://nyak.oh.gov.hu/doc/statisztika.asp>

La statistiko ne estas kompleta, celo de ĝia kreado estis nur simpla superrigardo de la tendencoj, mankas ekzemple la subdividoj pri niveloj de ekzamenoj (baza-, meza-, supera...)

En Hungario funkcias pli ol 10 akredititaj lingvoekzamenaj centroj. En la komencaj jaroj oni ne havis unuecan statistikan sistemon, ĉiu rolulo en ĉiu ekzamena centro raportis laŭ sia propra prefero. Iuj kalkulis la kvanton de ekzamenoj, aliaj nombri nur la sukcesajn okazojn, triaj kalkulis ne la ekzamenojn, sed la personojn, kelkaj kalkulis aparte la baznivelaĵojn, mezajn- kaj superaĵojn (B1, B2 kaj C1 respektive), foje oni subtrahis la kvanton de ripetitaj ekzamenoj, foje ne - do la sistemo estis konfuza. Estis anoncigitaj malsamaj nombroj en la retpaĝoj de la ekzamenaj centroj, en gazetartikoloj, en raporto de vicdirektoro de la ekzamena centro, aŭ en la raporto de Princz Oszkár la tiama gvidanto de la Esperantaj aferoj, kaj simile. Lige al la enkonduko de KER-niveloj en la jaroj 2006 /2007 oni klopodis unuecigi, rekalkuli la ĝistiamajn nombrojn, kaj enkondukis unuecan sistemon. Laŭ tiu datumaro oni elkalkulis la averaĝan sukces-kvociendon (ĉ. 70 %, por ĉiuj ekzamenoj kaj lingvoj), kaj uzante tion ili re-kalkulis la mankantajn datumojn en la datumaro de la komencaj jaroj.

Tiuj 70 %-oj aperas en mia tabelo pro tiu kialo, kaj la signo * aludas pri la neakurateco de la nombroj.

Kelkaj kernaj punktoj kaj demandoj

Mi opinias, ke la situacio en Hungario estas unika evento en la historio de la Internacia Lingvo. Fakte ja okazis "malgranda fina venko" - kiu tamen venis al velko. Por ni (kiel internacia movado) gravas la spertoj kaj farendaj konkludoj por prepari nin al pli bonaj solvoj, eviti la erarojn ĉe eventuala simila pozitiva okazo en alia lando aŭ ĉe eventuala akcepto de Esperanto kiel oficiala lingvo en iu interŝtata strukturo... - Ni supozu ekzemple, ke en Francio aŭ en alia lando oni subite aprobas enkondukon de Esperanto inter la abiturientaj ekzamenoj... - aŭ io simile...

* **La movadaj organizoj restas sen gvidantoj:** - Evidentiĝis, ke merkata instruado de Esperanto povas doni eĉ signifan enspezon, do multaj aktivuloj, klubgvidantoj komencis tuj okupiĝi pri privata, paga instruado de studentoj, lernantoj. Tio rezultis, ke ili ne plu havis liberan tempon por la tradiciaj movadaj taskoj - do plejmulto de grupo kaj kluboj restis sen gvidantoj, sen aktivuloj... - la antaŭe vigla movado frostiĝis.

* **Motivo de la instruistoj:** - Por libermerkata instruado oni ne bezonas permeson, neniu rajtas ĝin kontroladi - do oni havas nur ege malmultajn rimedojn por influado de la agado de kursgvidantoj, instruistoj. Dum multaj jaroj mi funkciigis instruisto-perantan servon, en mia datumbazo estis pli ol 250 personoj, kiuj estis pretaj instrui Esperanton private, aŭ faris tiajn anoncojn en gazetoj, en interreto. Pli ol duono de ili neniam aperis en la tradicia movado, ili lernis ie la lingvon, kaj poste komencis mem instruadi. Evidente ili ne nur ne povas transdoni movadajn konojn, sed ili mem ne havas tion! - Ekzistis nur tre malmultaj instruistoj, kiuj estis pretaj dum la kurso akompani siajn entuziasmajn lernantojn al iu E-aranĝo (kutime junulara).

* **Lingva nivelo de la instruantoj:** - Estas tikla demando ankaŭ la lingva nivelo. Enkadre de la menciita instruisto-pera servo ofte mi ricevis plendojn, negativajn raportojn pri iuj instruistoj pro ilia lingva nivelo aŭ instrua agado - sed mi (kaj ankaŭ niaj formalaj institucioj E-asocio kaj Fondaĵo) ne havis iun ajn rimedon por kontraŭagi. Estis pluraj instruistoj, kiuj organizis instruadon kaj kurson eĉ sen sukcese trapasita ekzameno, kaj estis multaj, kiuj NENIAM parolis vive en Esperanto (krom dum sia ekzameniĝo kaj krom kun siaj studentoj...)

* **Trompaj reklamoj:** - Mankis eblo ankaŭ por kontraŭagi al evidente trompaj reklamoj de instruistoj - sen esti akuzita pro "atako de konkurenco"... :-((

* **Apreza sistemo pri instruistoj:** - Plurfoje leviĝis la ideo krei iun aprezan sistemon pri instruistoj ankaŭ en kadro de la hungara sekcio de ILEI, sed pro diversaj kialoj ili neniam havis rezulton. Ankaŭ mi mem ne havas bonan proponon.

* **Ekzamena komisiono:** - Oni devas konfesi, en la komenca periodo okazis kelkaj internaj problemoj ankaŭ en la Esperanta ekzamena teamo. Ekzistis onidiroj pri "facile ricevitaj" atestiloj por iuj, okazis revoko el la posteno, estis elreviga la konduto de kelkaj personoj en la komisiono - sed la tuto okazis antaŭlonge kaj la koncernaj personoj jam ne vivas aŭ ne estas inter ni.

* **Financoj, vivteno:** - Ni ne malkaŝu, financoj ludas signifan rolon en la tuta ekzamena sistemo. La ekzameno mem kostas monon, ĉ. 90 eŭrojn, la eldonado de vortaroj, lernolibroj kaj kursomaterialoj ja vere estas komerco kun signifa buĝeto, kaj instruado povas doni signifan enspezon. Dum la pintaj jaroj ĉirkaŭ 2007-2011 laŭ mia datumbazo - krom instruistoj de nia lingvolernejo Lingvo-Studio - estis aliaj 10-12 personoj, kiuj havis la ĉefan salajron aŭ signifan vivtenan enspezon pro instruado de Esperanto. Estis eĉ kelkaj, kiuj maldungiĝis de siaj antaŭaj laborejoj por plentempe okupiĝi pri Esperanto. Kiel videblas el la dua figuro, post kelkaj jaroj draste malaltiĝis la kvanto de lernantoj, tiuj instruistoj restis sen enspezo - sed ne ĉiuj povis jam reiri al sia antaŭa laborejo... (kun ĉiuj ties sekvoj) :-((

* **Lernolibroj, aŭtoroj, komercado:** – Ŝlosilan lokon havas ankaŭ la eldonado kaj komercado de lerno-materialoj. Ĉe la enkonduko de nova sistemo, post unu-du jaroj elĉerpiĝas la disponebla stoko de lernolibroj kaj vortaroj - kaj la novaj eldonoj tre multe influas la estontan agadon. Temas pri moralaj, prestiĝaj pozicioj de la aŭtoroj, financa profito de la eldonado kaj komercado, influo pri la enhavo de la libroj (ĉu kun aldonitaj movadaj informoj, aŭ nur lingva enhavo, ktp). – Ties solvoj en Hungario rezultis akrajn financajn konfliktojn, kaj kolapson de la hungaria movado... (En Hungario la movado dispartigis, en la landa asocio HEA restis praktike aŭ ĉefe nur kelkaj pensiuloj kaj estraraj/prezidentaj titol-adorantoj.)

* **Manko de perspektiva merkata konduto:** – Egoisma kaj nemerkata konduto de instruistoj. Pro la instruado ĉiuj enspezoj aperas ĉe instruistoj kaj organizantoj de kursoj - sed preskaŭ ĉiuj el ili agas plene egoisme, sen merkata kunlaboro. Krom nia Esperanta Centro praktike neniu re-investis monon al paga ekstera reklamado de Esperanto, ĉiu uzis nur lokajn kaj senpagajn rimedojn por reklami sian instruadon aŭ siajn kursojn (lokaj aŭ senpagaj anoncgazetoj, fejsbukaj grupoj, ktp.) – Dum multaj jaroj nia Esperanto-Centro pagis kadritajn reklamojn en gazetoj, aranĝis radioreklamojn kaj financis poresperantajn reklamkampanjojn en interreto (Google, Facebook, Etarget, ktp.) - sed tio evidente estis nesufiĉa por teni pozitiva la eksteran famon de Esperanto. Pro manko de financa kunlaboro de aliaj instruistoj, en la lastaj jaroj ankaŭ ni reduktis tiun agadon.

* **Manko de merkatakaj agoj:** – Ĉe plejmulto de instruistoj, kaj ankaŭ ĉe Esperanto-organizoj plene mankis aplikado de merkatakaj scioj kaj agoj. Nek la landa asocio, nek la hungara sekcio de ILEI zorgis pri la ekstera bildo de Esperanto, neniu zorgis pri defendado de intereso (ĉe apliko de novaj reguloj, leĝoj, ktp), neniu zorgis pri reklamado, neniu kontaktis la decid-farantojn de unuopaj universitatoj - do la ĝenerala bildo pri Esperanto iĝis ĉiam pli malbona.

* **Post la ekzameno oni tuj forgesas la lingvon...** - Esperanto estas vere rapide lernebla, sed el tio sekvas, ke ne estas tempo por maturiĝo, por sedimentiĝo de la akirita scio - do same rapide oni povas forgesi ĝin. Estas elrevige renkonti antaŭajn kursanojn kun sukcesa B2 ekzameno, kiuj post 1-1,5 jaroj komprenas nenion (!) el Esperanta teksto... - Ankaŭ tiu sperto influis nian lastatempan decidon plilongigi niajn kursojn ĝis 6 monata longo... (Sed tiu decido koncernas bedaŭrinde nur tiujn en nia propra lingvolernejo Lingvo-Studio) - Alia solvo estus engaĝigi la ekzamenintojn al la reala Esperanto-komunumo, Esperanto-movado, sed tio estas alia temo...

La studenta flanko - kiuj lernis Esperanton?

Kompreneble ekzistas multaj diversaj motivoj. Tamen oni sciu, ke bonaj studentoj jam sukcese trapasis la lingvan ekzamenon pri la angla jam antaŭ la universitato, aŭ dum ĝi... Plej grandan tavolon de Esperanto-lernantoj konsistigis tiuj, kiuj

1. ne kapablis ellerni alian lingvon, do por ili ankaŭ Esperanto estas malfacila tasko.
2. finis la universitaton, sed pro manko de lingvo-ekzameno ili ne ricevis sian diplomon. Tiuj personoj jam laboras, havas familion, infanojn – do ajna lingvokurso por ili estas aldona, plusa, ekstrema ŝarĝo - des pli, ke ili ne havas lingvan kapablon, antaŭe ili ne sukcesis, ne kapablis ellerni la anglan aŭ la germanan...

Kompreneble ekzistas ankaŭ aliaj, sukcesaj, kapablaj kursanoj, mi menciis nur la ĉefajn, plej grandnombrajn grupojn.

Unu el la motivoj de la kursanoj lerni Esperanton estas la signife pli malalta kostonivelo ol tiu de la naciaj lingvoj. Por havi konkretan bildon: averaĝa kotizo de unuŝtupa kurso, gvidanta la lernanton de nulo ĝis la mezgrada (B2) ekzameno dum 100-120 horoj (en 4-5 monatoj) estas ĉ 120 mil forintoj, t.e 310-330 eur, la samo por naciaj lingvoj estas kutime min. 2-3-oblo de tiu. La prezoj varias, oni povas trovi Esperantan kurson ankaŭ por la duono kaj ankaŭ por la duoblo de tiu sumo. (Interesiĝantoj povas ĵeti rigardon al nia retpaĝo, rimarku la verdan flagon por la Esperanta versio: <http://www.eszperanto-tanfoljam.hu>)

Kie estas tiuj multaj kursfinintoj?

Evidente la motivo de studentoj estas kiel eble plej simple, rapide, malmultekoste trapasi kaj solvi la lingvan aferon. Ĉe la kursa aliĝo "Esperanto" estas por ili simpla solvenda tasko, unu el la devigaj, altruditaj studobjektoj – nenio pli.

Tamen dum la kurso multaj **lernantoj ekŝatas la lingvon, la ideon, kaj ili fervore entuziasmiĝas**, ili planas partopreni la socian vivon (vojaĝojn, renkontiĝojn, ktp). Post la ekzameno tiuj studentoj tamen ne ricevas inviton al adekvata LOKA societo, kunveno, kie ili povus engaĝiĝi al socia E-vivo, ĉar la Esperanto-asocioj, nek la junularaj, nek la plenkreskaj, nek la pli spertaj aktivuloj tute **ne okupiĝas pri ili**. La entuziasmiĝo velkas, kaj se ene de 1-2 monatoj ili ne havas eblojn al personaj renkontiĝoj kaj kontaktoj, la entuziasmiĝo estingiĝas, kaj la tuta kursoperiodo restas nur bela memoraĵo...

Do pri la movada foresto **kulpas NE la kursanoj mem, sed nia tradicia movado**, kiu ne sukcesas integri la novulojn... :((Tiu konstato validas ne nur al la hungariaj Esperanto-lernantoj, sed ankaŭ al lernantoj de Lernu- kaj Duolingo-kursoj...

Mi eble notu ankaŭ pozitivajn erojn. Unu (sed nur unu) el la 4-5 tutlande uzataj lernolibroj enhavas post ĉiu leciono nacilingvan inform-legaĵon, rakontanta pri la Esperanto-movado, kaj la konkretaj aplikebloj de la lingvo (aranĝoj, libroj, radio, interreto, ktp). Post la ekzamenoj pluraj niaj kursanoj "gustumis" la esperantumadon, kelkaj el ili eĉ akceptis iun funkcion. Lernis en nia lernejo ekzemple pluraj estraranoj de la hungara junulara asocio, aŭ Nemes Anikó, la posta bibliotekistino en la biblioteko Fajsz, kaj Szilva Szabolcs, konata E-instruisto en Varsovio, Záhonyi Lajos, la gvidanto de hungaraj Esperantaj skoltroj, aŭ eĉ Poór Veronika la antaŭa direktoro de CO de UEA, ktp. – Estas interese, ke lernis ĉe ni ankaŭ kelkaj altrangaj ŝtatoficistoj, kiuj ne donis permeson menci ilian nomon. Unu konsulo antaŭ du tagoj ekzameniĝis kun sukceso... Jes, vera konsulo, ne kiel tiuj de la Civito... :-)))

Resume:

Dum la pasintaj dudek jaroj en Hungario sukcese trapasis Esperanto-ekzamenon pli ol 35.000, t.e. Tridek-kvin-mil homoj. Simila afero pli frue nenie kaj neniam okazis en Esperantujo.

La hungaria malgranda venko - kaj posta velko estas iu bestkuracista ĉevalo, iu modelo, kies evoluon indas studi por eviti similajn erarojn ĉe la sekva favora situacio en Esperantujo.

Aliflanke ni povas ĝoji kaj fieri pri la atingitaj rezultoj!

Dum la pasintaj 20 jaroj okazis multaj interesaj historietoj, eventoj - ekz, kiel **Esperanto ricevis la statuson de "viva lingvo"**, bezono pri oficialaj deklaroj de aplikeblo de Esperanto en tiu aŭ alia universitata stud-fako, luktoj por esti gvidanto de la E-fako en la ekzamena centro, trukoj de studentoj dum ekzamenoj, kaj multaj aliaj - tion eble iam prilaboros verkistoj kaj historiistoj en siaj verkoj kaj studoj...

László Szilvási,

Lingvo-Studio, LS

P.S. La artikolo aperis en la revuo La Ondo de Esperanto, 2021-02

